



*Letero pri  
la felico*

# Letero pri la feliĉo

Epikuro

Traduko de Fernando Pita (nandopit ĉe uol.com.br)

Eldono de Torixoréu Libroj

Unua eldono.

Aŭgusto de 2005.

**Uzo:** Vi rajtas kopii kaj distribui ĉi verkon por ne-komerca celo se vi mencias la aŭtoron kaj la tradukinton, ne ŝanĝas la verkon, kaj klarigas pri ĉi uzokondiĉoj. Pri aliaj uzoj demandu la tradukinton. La verko estas liverata laŭ licenco de Creative Commons:

<http://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/2.0/br/>.

## Letero pri la feliĉo (al Menekeo)

Epikuro sendas siajn salutojn al Menekeo

Neniu hezitu sindediĉi al Filozofio dum junaĝa, nek laciĝu tion fari kiam oldiĝita, ĉar neniu neniam estas tro olda por traserĉi la spiritan sanecon. Tiu kiu deklaras nealvenatan la horon por sindediĉi al Filozofio, aŭ ja ĵuspasintan, tiu estas kiel dirinte nealvenata aŭ ĵuspasinta la horo por esti feliĉa. Tiamaniere, tiom utilas Filozofio al la junulo kiom al la oldulo, por ke tiu kiu maljuniĝas sentu sin rejuniĝanta per la benata akordemo de aferoj jam foririntaj, kaj por ke la junulo estu kapabla maljuniĝi ne timante aferojn tujvenontajn necesas do zorgi pri l' aferoj portantaj nin feliĉon, ĉar, se tiu-ĉi ĉeestas, ĉion ni havas, kaj, sen ĝi, ĉion oni faras por ĝin sukcesi.

Praktiku kaj kulturu do tiuj instruoj kiaj mi ĉiam al vi transsendis, certa ke ili konstituas la fundamentajn elementojn por feliĉa vivo.

Unue, konsiderante diecon kiel senmorta kaj bonŝanca esto, kiel sugestas la komuna percepto de diecon, ne aljuĝu ĝin nenio nekonforma al via senmortecon, nek netaŭga al via bonŝanceco, pensu pri ĝi ĉion kion kapablas konservi la feliĉon kaj senmortecon.

La dioj fakte ekzistas kaj estas videbla la kono kiun ni havas pri ili; sed la imago de ili farita pri la plejmulto el la personoj, tiu ne ekzistas: personoj ne kutimas gardi la ideon kiuj komponas pri la dioj. Malpia ne estas tiu kiu rifuzas la dioj en kiuj la plimulto kredas, sed tiu kiu aljuĝas al la dioj la falsaj juĝoj el tiu plimulto. Fakte, la juĝoj de la popolo pri la dioj ne baziĝas sur denaskaj nocioj sed en falsaj opinioj. Ekde tie la kredo pri tio ke ili kaŭzas la plej grandaj malbonoj al la malbonuloj kaj la plej grandaj bonoj al bonuloj. Fratigitaj per siaj propraj virtoj, ele akceptas nur la kunvivado kun siaj gesimilantoj kaj konsideras stranga ĉion kion al ili mem malsimilu.

Alkutimiĝu al la ideo tiu, kiu morto por ni nenio estas, ĉar ĉia bono kaj ĉia malbono loĝas ĉe la sensacioj, kaj morto estas nur la finiĝo de tiaj sensacioj. La klara konscienco sur tio, kio estas morto nenio signifas por ni plenan fruon de fluanta vivo, ne volante aldoni al ĝi senfinan tempon kaj nuligante deziron pri senmortecon.

Nenio terura ekzistas en la vivo por tiu kiu perfekte konvinkiĝis ke nenio terura ekzistas en lasi la vivon. Stultas do kiu deklaras timi morton, ne ĉar la alvenon de tiu-ĉi alportos suferon, sed ĉar afliktas lin la atendado mem: tio kio ne ĝenas nin kiam ĉeestanta ne devus aflikti nin dum atendatas.

Do la plej terura el ĉiaj malbonoj, la morto, nenio signifas por ni, ĝuste ĉar, kiam ni vivas, estas morto kiu ne ĉeestas, kontraŭe, kiam morto ĉeestas, estas ni kiuj ne. Morto do estas nenio, nek por vivantaj, nek por mortintaj, ĉar por tiuj ĝi ne ekzistas, kaj por tiuj-ĉi ne plu estas tie-ĉi. Sed la plimulto el la personoj aŭ fuĝas el morto kiel la plej terura el la malbonoj, aŭ ĝin deziras kiel ripozo por la malbonoj de la vivo.

Sed la saĝulo nek malestimas vivi nek timas lasi vivi, por li, vivi ne estas ŝarĝo kaj ne-vivi ne estas malbono.

Tiel kiel li preferas por la plej bongusta manĝaĵo kaj ne por la plej abunda, sammaniere li rikoltas la dolĉaj fruktoj de, tamen rapida, bonvivita tempo.

Kiu konsilas la junulo bone vivi kaj la oldulo bone morti ne estas pli ol stultulo, ne nur ĉar vivo agrablas ambaŭ, sed ankaŭ ĉar oni devas havi ekzakte la saman zorgon en honeste vivi kaj honeste morti. Sed plej malbona estas tiu kiu diras: bone estus ne naskiĝi, sed foje naskita, trapasi la plej rapide ebla la pordoj de Hadeso.

Se li tion diras plene konvinkite, kial ne foriras el tia vivo? Ĉar oni estas libera por tion fari, se tia fakte estas onia deziro, sed se li tion diris ŝerce, frivolulo estis, ŝerce paroli pri aferoj kiaj ŝercojn

ne permesas.

Oni neniam devas forgesi ke la estonto ne estas tute nia, nek tute ne-nia, sed por ke ni ne estu devigataj atendi ĝin kiel se ĝi estus tujvenonta, nek malesperiĝi kiel se ĝi ne alvenus neniam.

Oni konsideru ankaŭ tion ke, inter la deziroj, estas tiuj kiuj estas naturaj kaj tiuj kiuj estas senutilaj, el la naturaj, estas kelkaj kiuj estas necesaj kaj aliaj kiuj estas nur naturaj, el la necesaj, estas kelkaj kiuj estas fundamentaj por feliĉon, aliaj, por korpa bonfarto, aliaj ankoraŭ por vivo mem. Kaj la sekura kono de la deziroj nin faras direkti ĉian elekton kaj ĉian rifuzon al korpa sano kaj al spirita sereneco, ĉar tia estas la objektivo de la feliĉa vivo: pro tiu objektivo ni praktikas ĉiuj niaj agoj, por distancigi nin el doloro kaj timo.

Unufoje ni atingos tiu stato, ĉia anima tempesto kalmiĝas, kaj la vivanta esto, kiu ne plu devas traserĉi ion kio al si mankas, nek serĉi io ajn krom la anima kaj korpa bonfarto, tiu sata estos. Fakte, ni nur sentas la neceson de la plezuro kiam mi suferas pro ĝia malĉeesto; kontraŭe, kiam ni ne suferas, tia neceso ne sentiĝas.

Tia estas la kialo per kiu ni asertas tion ke la plezuro estas la komenco de reala feliĉo vivo, ni identigas ĝin kiel la unua bono kaj apartenanta al la homa esto, por kiu ni praktikas ĉian elekton kaj ĉian rifuzon, kaj al ĝi ni alvenas elektante ĉian bonon akorde kun la distingo inter plezuro kaj doloro.

Malgraŭ nia plezuro estos nia unua kaj naskita bono, nek pro ĝi ni elektas iu plezuro ajn: estas momentoj en kiuj ni evitas multe da plezuroj, kiam ili alvenigas nin efektoj malagrablaj, ĉar ni konsideras multaj suferoj preferendaj al plezuroj, se plezuro pli granda alvenos poste ni suportu tiuj doloroj por multe da tempo. Do ĉia plezuro konstituas bonon pro sia naturo mem; sed ne pro tio ne ĉiuj estas elektataj; sammaniere, ĉia doloro estas malbono, sed ne ĉiuj devas esti ĉiam evitendaj. Konvenas do mezuri ĉiuj plezuroj kaj suferoj laŭ la kriterio de la beneficoj kaj damnoj. Estas situacioj en kiuj ni utiligas bonon kiel se ĝi estus malbonon, kontraŭe, malbono kiel se bono.

Oni konsideru ankoraŭ memsufiĉon kiel grandan bonon, ne ni devu satiĝi kun malmulto, sed por ke ni kontentiĝu kun tiu-ĉi malmulto se ni ne havu la multon, honeste konvinkitaj de tio ke pli bone fruas abundon tiuj kiuj malpli de ĝi dependas; facilas sukcesi ĉion kion estas natura, malfacilas ĉion senutilan.

La plej simplaj manĝaĵoj kunportas nin la saman plezuros ol la plej rafinitaj pladoj, ekde kiam oni ne sentu la doloron kaŭzita pro ĝia manko: pano kaj akvo produktas la plej profunda plezuro kiam englutataj por tiuj kiuj iom da ili necesas.

Alkutimiĝi al la plej simplaj aferoj, al neluksa vivenda modo ne nur konvenas do al saneco, sed estas ankaŭ portas al la homo rimedoj por kuraĝe alfronti la kontraŭecoj de la vivo: en tempoj kiuj ni sukcesas havi riĉan ekzistadon, antaŭdisponas nian animos por pli bone ĝin profiti, kaj prepariĝas nin por sentime alfronti la malfacilaĵoj de la sorto.

Kiam ni do diras ke la plezuro estas la fina objektivo, ni ne referas al plezuroj de la nemoderuloj aŭ al tiuj kiuj konsistas la ĝuon de la sensoj, kiel kredas iajn personojn kiuj ignoras nian penson, aŭ ne akordas kun ĝi, aŭ erare ĝin intepretas sed al tiu plezuro kiu estas la malĉeesto de fizikaj suferadoj aŭ ĝenoj de la animo. Ne estas do trinkaĵoj kaj bankedoj sinsekvaj, nek posedo de virinoj kaj junuloj, nek gusto de fiŝoj aŭ aliaj bongustaĵoj el riĉa tablo kiuj dolĉigas la vivon, sed zorgema ekzameno kiu serĉu la kaŭzojn de ĉia ajn elekto kaj ĉia ajn rifuzo, kiu forigu la falsajn opiniojn per kiuj grandegan perturbon alproprigas la spiritojn. El ĉiuj tiuj aferoj, prudento estas la principo kaj suprema bono, kialo per kiu ĝi estas pli grandvalora ol la Filozofio mem, ĉar estas el ĝi originintaj la aliajn virtojn, ĝi lernigas nin tion kon ne ekzistas vivo feliĉan sen prudento, beleco kaj justeco, kaj tio ke ne ekzistas prudento beleco kaj justeco sen feliĉo. Ĉar la virtoj estas minimume ligitaj al feliĉon, kaj feliĉo estas nedisigebla el ili.

Laŭ via opinio, ĉu ekzistos iun pli feliĉa ol la saĝulo, kiu havas respektindan juĝon pri la dioj, kiu konduktiĝas laŭ tute indiferenta maniero antaŭ la morto, kiu bone komprenas la objektivo de la naturo, kiu disigas tion ke la supera bono estas en tiuj aferoj simplaj kaj facile havendaj, kaj tio ke la suprema malbono, aŭ ĝi malmulte daŭras aŭ kaŭzigas nin rapidaj suferoj? Kiu neas la destinon, reprezentita por kelkaj kiel la estro de ĉio, ĉar la aferoj okazas por neceso aŭ hazarde, aŭ por nia propra volo; kaj tiu neceso estas nesubmetebla, tiu hazardo, nestabila, dum nia volo estas libera,

---

kialo por kiu nin akompanas cenzuron kaj laŭdon?

Pli bone estas akcepti la diaj mitoj, ol esti sklavo de la destino de la naturalistoj: mito almenaŭ oferas nin esperon pri la pardonon de la dioj per la homaĝoj kiu nin al ili faras, dum la destino estas nemovigebla neceso.

Ĉar mi komprenas ke sorto ne estas dieco, kiel la plejmulto el la personoj (ĉar neniam ajn dio neniam faras hazarde), nek ion necertan, la sciulo ne kredas ke ŝi donu al la homoj iu ajn bono aŭ iu ajn malbono kiuj estu fundamentaj por vivo feliĉa, sed ja, ke el ĝi povas ekkomenci grandajn bonojn kaj grandajn malbonojn. Laŭ sia vidpunkto, prefereblas esti senfortuna sed sciula, ol fortunema kaj stulta; fakte plibonas ke projekto ne alvenu ĝis bona fino ol malbona projekto estu sukcesa.

Pripensu do pri ĉiuj tiaj aferoj kaj multaj aliaj al ili samgeneraj, tago kaj mokto, kun vi mem kaj viaj similuloj, kaj neniam plu vi sentiĝos vin ĝenita, ĉu desperta, ĉu dormanta, sed vi vivos kiel dio inter la homoj. Ĉar neniel similas al mortanta tiu homo kiu bone vivas inter mortantaj.

fino